FN PER ANC 47

# NORMANDA ESPERANTO BULTENO

BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO Nº I9.

MARTO I972.

Redaktas: S-ro JOUIS E. 62I Rue Georges Mugnier - 76 BOISGUILLAUME.

Sendu la manuskriptojn antaŭ la I0a de Februaro, I0a de Majo, I0a de Aŭgusto, I0a de Novembro.

ENHAVO.

- Ĉu ni estas pretaj?
- Kampanjo apud la Ĝeneralaj Konsilantoj.
- Kunveno de la estraro de la Normanda Federacio en VI...
- Kongreso de la Normanda Federacio en VIRE.
- Ĝenerala Kunveno de U.N.E. en ROUEN.
- Turisma kalendaro ( suplemento.)
- Varbu pri Esperanto.
- Vivo de la Grupoj.
- Ni Funebraj.

## ĈU NI ESTAS PRETAJ ?

Iam vi aŭdis pri Esperanto....

Vi informiĝis - Vi konstatis la taŭgecon de la Lingvo -

Vi lernis ĝin - Eble vi agadis por ĝia disvastigo; eble, ne...

Fervoraj Esperantistoj penas por konogi la Internacian Lingvon, kelkaj iomete; kelkaj multe; kelkaj eĉ donas sian tutan disponeblan tempon..... Kompreneble, ne ĉiu havas la kompetencon agadi, ĉu en propagando.. ĉu en instruado, ĉu en klopodoj por vivteni la Grupon. Ne ĉiu havas la tempon, la sanon, aŭ la energion, aŭ la emon labori por Esperanto.

Sed ĉiu Esperantano devas konsciiĝi pri la jeno : iam, en iu lando aŭ en pluraj landoj samtempe, oni petas de la Esperantistoj ke ili pruvu sian kapablecon. Oni diros al ni: " Vi pretendas ke Esperanto estas facila kaj oportuna instrumento de interkomunikado : venu do amase elmontri viajn kapablojn...."

ĈU NI ESTAS PRETAJ sukcese trapasi tian ekzamenon? Kiel vi imagas la rezulton se tiam montras sin nur aro de balbutoj, hezitemaj uzantoj de la lingvo.?

Kion ni faru? Nu! ni fariĝu lertaj en la uzado de la lingvo!
Ni alkutimiĝu je rapida legado, skribado, kaj traduko de tekstoj.
Ni pensu en Esperanto.
Ni ekzercu la parolon : ni kompensu la mankon de praktikado lernante parkere frazojn, tekstojn, kaj poemojn.
Ni ne maltrafu ĉiam eblon utiligi la lingvon.

Ĉiu povas, ĉiu devas pretigi sin por tiu evento.

NI ESTOS PRETAJ !

S-ro Gibaux

## - KAMPANJO APUD LA GENERALAJ KONSILANTOJ.

Ne forgesu, ke en la tuta lando okazas kampanjo apud la Generalaj Konsilantoj por ke ĉiu departemento voĉonu mocion favoran al la intruadon de Esperanto.

Pasintjare jam 3 departementoj voĉonis tiajn mociojn. Se vi jam ne ricevis iliajn tekstojn, vi povas ricevi ilin kun aliaj utilaj dokumentoj skribante al U.F.E. 34 Rue de Chabrol. PARIS 10éme.

Ni konsilas al vi ankaŭ donaci al via Generala Konsilanto la Libron " Une Langue Internationale " ( vidu informojn en tiu numero.)

Ĉiu grupo devas partopreni en tiu kampanjo. Ne atendu! Baldaŭ okazos la nova sesio de la konsilantaro en ĉiu departemento.

P. POTTIER.

& && & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & && & &

## - Kunveno de la estraro de la NORMANDA FEDERACIO. -

La 6an de Februaro kunvenis en Sotteville les Rouen je la 14a30 la estraro de la Normanda Federacio. La celo de la kunveno estis la starigo de la programo de la Generala Kunveno en Vire. Vi trovos ĉi-poste tiun programon.

& & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & & &

## KONGRESO DE LA NORMANDA FEDERACIO.

La Kongreso de la Normanda Federacio okazos e VIRE ( Calvados) je la 25a kaj 26a de Marto. Ekskurso al Mont Saint Michel okazos, se estos sufiĉe da partoprenantoj.

- Ili sin anoncu rapide. -

La urbo kaj ties regiono estas allogaj laŭ turisma kaj gastronomia vidpunktoj.

**V E N U M U L T N O M B R A J !!**

Per trajno oni povas atingi VIRE de Rouen, Lisieux, tra Argentan aŭ Caen. De Caen sufiĉe multaj aŭtobusoj veturas al Vire. Dimanĉon vespere aŭtobuso veturas al Caen( Alveno Gare Routiere 19a)

Por informiĝo oni sin turnu al

Sinjoro M. COLBEU Chef de Gare.
14 - VIRE. C.C.P. 58 - 54 - 74 Paris

aŭ al Sinjoro LEGRET A.
Delegito de U.E.A.
14 Rue des Sablonnieres. 14 - VIRE.

La detala programo de la kongreso aperis en la lasta numero de la Normanda Bulteno( N° 18a)

Vire atendas vin !!
vidu la programon..

- Programo de la Kongreso;-

La programo de la Generala Kunveno de la Federacio okazonta de la Federacio okazonta en la Urbodomo la 26an de Marto je la 9a Horo.

- Morala Raporto,
- Financa Raporto.
- Renovigo de la triono de la konsilio.
- Raportoj de la grupoj.
- Diskuto pri la raportoj.
- Preparado de la Nacia Kongreso.
- Elekto de la reprezentanto.

Aliĝu tuj al la Kongreso!!

---

## - VARBU PRI ESPERANTO. -

En tiuj tagoj de Eŭropa tendenco mi pensas ke: se ni ne volas uzi la Anglan Lingvon ( mi havas nenion kontraŭ la Anglan Lingvon; sed mi multe preferas la esperantan), kiel Eŭropan Lingvon, ni imperative devas varbi pri Esperanto, kiel? Mi pensis al varbado kiun ĉiuj povas fari. Ne timu: estas tre facile, ne elspeze, kaj eĉ amuze kaj ebligas al ĉiuj uzi Esperanton.

Tiu varbado konsistas en skribado. Ni ĝenerale volas disvastigi Esperanton, sed neniam uzas ĝin!

Se ĉiuj esperantistoj ĉiu-monate, sendu leteron, nur unu leteron esperantlingve skribitan al diversaj radioj por peti iliajn esperantlingvaj-programojn aŭ ĉu ili intencas elsendi esperantlingve, la radioj fine konus esperanton kaj elsendus; ne gravas ĉu vi na aŭdas radion; la gravan kialo estas konigi esperanton. Ankaŭ vi povas skribi al " Féderation des Villes jumelées" aŭ al aliaj internaciaj institucioj! mi ankaŭ skribas kiam mi aĉetas eksterlandan aparaton ( foto-aparato, radio aŭ alia) por demandi kelkajn informojn pri tiuj aparatoj al la fabrikantoj! Kion vi pensas pri tio? Ĉu vi havas informojn aŭ ideojn? Bona varbilo estas ankoraŭ skribi sur viaj kovertoj " Lernu Esperanton " ĉar ni devas konatiĝi esperanton al la neesperantistoj.

Resume: Unu letero ĉiun monaton kostas 90 Frankoj.
Kaj: Bonvolo ...

Kiam vi skribas al firm ao aŭ alia organismo petu de viaj leteraj amikoj ke ili faru same kaj ke ili demandu al siaj leteramikoj ankaŭ fari same, tiel ni povas fari ĉenon ĉirkaŭ la tuta mondo kaj la firmaoj vidante multajn leterojn senditajn el la tuta mondo, konatiĝus kun esperanto kiel vera fakto ne kiel fantazio kaj pensante pri la komerco kaj havante monon por tiu celo ili faros prospektojn esperantlingve skribitajn, tiel varbante pri nia movado.

Ne gravas se vi estas komencanto, ne estas ekzameno sed leteroj kiuj permesas al vi utiligi esperanton kaj kontroli ĝian efikecon.

Kiam vi skribas estas preferinde doni la adreson de la delegito de la urbo kien vi skribas; tiamaniere la eventuala korespondanto neesperantisto povas havi tradukon de via letero.

A. CHALM. ( Le Havre.)

## - 1972 - SUPLEMENTO AL LA LASTA TURISMA KALENDARO .

Planu viajn venontajn feriojn kaj elektu !

| | | |
|---|---|---|
| - MARTO - | - 11 | . Esperantista renkontiĝo. Leipzig. Germ. Dem. Resp. |
| | - 11 - 12 | . Generala kunveno de Svisa Esp. Gwatt. Svisujo. |
| | - 25 - 26 | . Normanda Federacia kongreso de U.F.E. Vire. Francujo. |
| | - 27 - 3/4. | 3a Internacia Junulara Renkontiĝo de Germana Esp. Junularo Kronach. Germ. Fed. Resp. |
| - APRILO - | - 28 - 30 | . Slovakia Esp. Kongreso en Altaj Tatroj. Cekoslovakio. |
| - MAJO - | - 6 - 8 | . 2a Kongreso de Ĉeka Esp. Asocio. Ostrava. Cekoslovakio. |
| | - 11 -14 | . Ornitologia jarkunveno (L.E.E.N.) Zaandam. Nederlando. |
| | - 11 - 14 | . Sveda KELI jarkonferenco en Lundsbrunn. Svedujo. |
| | - 13 - 14 | ; Kultura semajfino. Renens. Svislando. |
| | - 27 - 28 | . Kongreso de Unuiĝo Normanda de la Esperantistoj. Rouen. |
| | - 30 - 2/6. | Esperantista Ferioj en Bournemouth. Britujo. |
| - JUNIO - | - 18 - 29 | . 2a int. Esp. Feriado en Miedzyzdroje. Pollando. |
| - JULIO - | - 9 - 15 | . 10a Somera Esp. Universitato. Gyula. Hungario. |
| | - 10 - 16 | . Seminario: Lingvo kaj Politiko. Tejo. Paris. Francio. |
| | - 15 - 21 | . 34a Kongreso de IKUE (Katolikoj) en Como. Italujo. |
| | - 15 - 16 | . 59a Kongreso de Japanaj Esp. en Takamatu. Japanio. |
| | - 15 - 31 | . 2a int. Labortendaro. Roccasecca. Italujo. |
| | - 17 - 23 | . Konferenco de Int. Ligo de Esp. Instruistoj en la kadro de la Kulturfestivalo de Budapest. Hungario. |
| | - 20 - 23 | . 7a Brazila Seminario en Curitiba. Brazilo. |
| | - 22 - 25 | . TEJO postkongreso en Gdansk. Pollando. |
| | - 23 - 30 | . Int. Feriaj Esp. Kursoj. Helsingör. Danlando. |
| | - 24 - 1/8. | Int. Tendumado en Torun . Pollando. |
| | - 26 - 2/8. | 25a Int. Kristana Kongreso. Melun. Francio. |
| - AUGUSTO - | - 12 - 19 | . Eŭropa Esp. Konferenco 72 en Zagrebo. Jugoslavio. |
| | - 19- 31 | . 40a Int. Blindula Kongreso. Rimini. Italujo. |
| - SEPTEMBRO - | - 1 - 8 | . 1a Int. Kongreso de Tutmonda Esp. Vegetarana Asocio en Bad Sachsa. Feder. Resp. Germ. |
| | - 30 - 7/10. | 5a Pupteatra int. Festivalo. Zagreb. Jugoslavio. |

......6...................

Bonvolu noti ke la nacia kongreso de U.F.E. okazos en Nantes de la 31a de marto ĝis la 4a de aprilo.

.........................

Ne forgesu la internacian somerumejon Primoŝten kaj Grésillon.

Por havi korespondadresojn pri tiuj renkontiĝoj skribu al

Petro LEMARCHAND
43 rue de Lessard
76 - R O U E N .

( Ne forgesu kunsendi poŝtmarkon por la respondo. Dankon, kaj agrablajn feriojn !)

# 36 a GENERALA KUNVENO de UNUIĜO de la NORMANDAJ ESPERANTISTOJ .

27 an / 28 an de MAJO 1972 en R O U E N .

-:- . Dum 1972 ni festos la 25 an datrevenon de la naskiĝo de Unuiĝo de la Normandaj Esperantistoj, kies fondiĝo okazis la 11 an de Majo 1947 . Jam unu kvaronjarcento forpasis ...!
La Kulturcentro de la Ruena regiono tutkore bonvenigos ĉiujn Normandajn Esperantistojn la 27 an kaj la 28 an de majo 1972 en Rouen por festi tiun eventon, kaj por plani fruktedonajn agadojn estontece.

-:- . ATENTU :
Pro la " Jeanne d'Arc " Festoj kiuj okazos dimanĉon la 28 an en Rouen, ni atentigas ĉiujn niajn amikojn, ke estas nepre necese ke ni havu kiel plej eble frue la tutan liston de tiuj kiuj deziros tranokti en Rouen. Ne forgesu ke pro tiuj internaciajj festoj, la hoteloj estos plenplenaj. Post la 15 a de Aprilo la Loka Kongreskomitato ne plu povos certigi loĝadon.

Pri la Hotelĉambroj : La prezoj estas nur indikaj. Se ĉambro en la kategorio petita ne plu estas rezervebla, la kongresservo elektos loĝadon el la plej proksima kategorio.

-:- . Do profitu la ŝancon partopreni nian provincan esperantistan kongreson en agrabla etoso, kaj dimanĉon post la bankedo kaptu la okazon ĉeesti la Johaninajn Festojn kune kun la internacia festivalo de militista muziko. Oni atendas la fanfaron de la Rajda Respublika Gvardio kaj famajn muzik--istarojn el Britujo, Belgio, Germanio, Svisujo, Hispanio, Usono kaj Francio.

-:- GEJUNULOJ : Sabate posttagmeze vi havos salonon por pridiskuti viajn specialajn problemojn. Ek de nun pristudu la jenan demandon :
Kial ne unuigi la diversajn normandajn gejunulojn ? ĉu pere de fakasocio, ĉu kunligi ilin dum semajnfinon aŭ pere de cirkulantaj leteroj, speciala rubriko en Normanda Bulteno ? Eĉ se vi ne povos veni en Rouen, skribu viajn ideojn sugestojn por vivigi en la junularaj medioj, nian lingvon en Normandio al Pierre LEMARCHAND 43 rue de Lessard - 76. ROUEN.

EKZAMENSESIO : Mi pretas esti Ekzamenanto. Mi posedas la jenajn Atestojn :

Mi deziras provi la jenan ekzamenon : Atesto pri Elementa Lernado.
Atesto pri Supera Lernado.

(Resendi la informojn al la supre skribita adreso.)

36 a GENERALA KUNVENO de UNUIGO de la NORMANDAJ ESPERANTISTOJ .

27 an / 28 an de MAJO 1972 en R O U E N .

## PROGRAMO

Kongressalonoj 2 kaj 3 en "Halles aux Toiles" Place de la Haute Vielle Tour 76 - ROUEN. (Apud la Sejno kaj la ponto Pierre Corneille, dekstra riverbordo.)

Sabaton la 27 an/5/72. : Ekde la 14 a, akcepto de la kongresanoj en Halles aux Toiles
Ekspozicio de esperantaj libroj.
16h00 : Ekzamenoj aŭ laŭvola vizito de la urbo.
Kunveno de la gejunuloj.
19h15 : Komuna vespermanĝo .
20h45 : Interfratiĝg kunveno en Halles aux Toiles
(Kunportu kantlibrojn kaj muzikinstrumentojn)

Dimanĉon la 26an/5/72. : 9h00 : Generala kunveno de U.N.E. (Halles aux Toiles)
12h45 : Bankedo.
15h00 : Estrarkunsido de U.N.E. en Halles aux Toiles
(Kongresĉambro n°4)

Kongreskotizoj individuo : 3 Fr.
Geedza paro : 5 Fr.
Eksterlandanoj, infanoj malpli ol 13 j. senpage.

Sabata vespermanĝo : 11 Fr.
Dimanĉa bankedo : 21 Fr.
Hotelĉambroj : 18 Fr. por du personoj } sen matenmanĝo.
: 16 Fr. unu -

Por gejunuloj estas eblecoj por tranokti en la junulgastejo. (Necesas havi loĝkarton
Bonvolu rilati kun la sekretario sufiĉe rapide.)

---

## ALIGILO

Nomo kaj antaŭnomo :
Adreso :
Mi aliĝas al la kongreso kaj sendas kun la aliĝilo :
Kongreskotizo :
Sabata vespermanĝo :
Dimanĉa tagmanĝo :
Mi deziras hotelĉambron por personoj
por noktoj (precizu la datojn)
liton en la junulgastejo por noktoj (precizu la datojn)
Parta antaŭpago por la hotelĉambroj : (10 fr. po nokto.)
Pagu per poŝtĉeko aŭ bankĉeko al : Pierre LEMARCHAND pĉk. Rouen 284 73 Z.
antaŭ la 15a de Aprilo : 43 rue de Lessard. 76- ROUEN.

## NOVA UTILA LIBRO.....

Ĵus aperis la libro " Une Langue Internationale," eldonita de U.EF.

Tiu franclingva libreto, lerte verkita, bonega propaganda verko. En 36 paĝoj, ĝi montras la lingvan problemon, ĝiajn eblajn solvojn kaj la multnombrajn avantaĝojn, kiujn havas Esperanto kompare kun la aliaj lingvoj: simpleco, klareco, precizeco, internacieco, belsoneco, pedagogia valoro. Poste ĝi detale montras la nunan staton de disvastiĝo de la lingvo kaj ĝian praktikan valoron. Fine troviĝas la opinioj de famaj homoj pri ĝi, kaj ĝiaj oficialaj agnoskoj.

Tiu valora libreto, kiu povas doni argumentojn por la propagando de Esperanto, devus esti en la libroŝranko de ĉiu Esperantisto. Gi povas ankaŭ esti sendata al la Generalaj Konsilantoj okaze de la kampanjo apud la Generalaj Konsilantaroj.

Mendu al U.F.E. Prezo: ĉirkaŭ 3 Frankoj.

()---()---()---()---()---()---()---()---()---()---()---()---()---()---()

## - VIVO DE LA GRUPOJ. -

### - VIRE -

Du kursoj okazas en la Junulara domo dank'al la afableco de ties Direktoro, S-ro Fougere. Progresigan kurson gvidas S-ro Colleu, staciestro ĉiun merkredon vespere. Gin vizitas 8 gelernantoj. Unuagradan kurson gvidas mi ĉiun sabaton posttagmeze. Gin vizitas 3 gelernantoj.

Dank'al la favoro de S-ro Donval, Prezidanto de la Turisma Asocio, esperantista teksto bone lokita estas metita en la turisma faldfolion pri Vire. Ankaŭ reklam-teksto pri la urbo troviĝas en la nunjara Jarlibro de U.E.A.

Dank'al la afableco de S-ino Le Cornec, direktorino de la gazeto " La Voix du Bocage " kaj de S-ro Reperant, peranto de ĵurnalo "Ouest France " artikoloj pri esperanto regule aperis en la du gazetoj.

Lastan jaron S-ro Colleu vizitis la Fervojistan Kongreson en Maribor ( Jugoslavio). En la nuna jaro li intencas viziti la kongreson en Lugano ( Svislando). Dum la lasta Julio li kaj mi partoprenis la Internacian Renkontiĝon en la Kastelo Gresillon.

Dank'al la sindonemo de S-ro Colleu la Normanda Kongreso okazos en VIRE la 25a kaj la 26a de Marto; je la samajdatoj okazos en Vire Kunveno de fervojistoj S-ro Mc Lennan brita samideano partoprenos la Normanda Kongreso.

Sinjoro Colleu intencas krei " Esperantistan Kulturan Centron en tiu Normanda Urbo

S-ro LEGRET A.
U.E.A. DELEGITO

## - LISIEUX. -

Decembre. Monsieur Tailpied nous presente le Congrès de Londres et nous fait entendre sur son magnetophone le discours du President Mr Lapenna. Il nous donne aussi ses impressions sur son premier grand Congrès et elles sont très favorables.

Janvier. Lundon IOan de Januaro la Leksovia grupo festis la Reĝojn. Ni kuniĝis en ĉambro de la Domo de de Junularo kaj Kulturo kie, kutime okazas niaj kursoj. Tiu-ĉi estas regule sekvataj de sep novaj gelernantoj? ( S-ro Martin ĉiam bonhumore gvidas ilin). La kursoj de la malnovaj ankaŭ estas regule selvataj de grupo de fideluloj por kiuj S-ino Rault ne ŝparas sian penon. Do, tiun lundon, ni estis nervaj enirante en la ĉambron kaj vidante la longan tablon bone aranĝitan de nia junaMichel, kiu forgesis nek la kukojn, nek la trinkaĵojn nek la muzikilojn.

Gaje ni manĝis.

Baldaŭ ni aklamis 3 Reĝojn, 3 reĝinojn, ni levis la glasojn kaj trinkis. Ni ludis kaj kompreneble ridis. Poste ĉiuj dancis, junaj kaj maljunaj.....

Agrabla vespero !

Ni disiĝis projektante rekomenci proksiman jaron.

M. QUILLET.

---

## - Le Havre -

La I3an de Februaro, la grupo organizis Reĝo-feston. Pli ol 40 personoj ĉeestis ĝin, ĉefe el Le Havre kaj Yvetot. Sinjoro Laney, kiel kutime prezentis tre lertajn ĵonglaĵojn kaj poste ĉiuj kantis kaj manĝis la kukon en tre gaj estoso

Dankon al la Havra grupo, ĉefe al ĝia Prezidantino por tiu agrabla tago.

---

## - Yvetot -

La IOan de Januaro, la Esper ntistoj festis la Reĝojn kiel kutime. Proksimume 30 personoj ĉeestis la feston kaj gaje manĝis la kukon.

La 5an de Februaro okazis letervespero, dum kiu oni povis vidi kaj legi la multajn leterojn kaj kartojn ( pli ol I20 ) recivitajn el la tuta mondo.

La 3an de Marto okazis prezentado dediapozitivoj pri Grsillon okaze de la 20a datreveno de la fondiĝo de tiu mirinda Esperantista Kulturdomo;

Notu Bone. Nia bela kastelo atendas vin ekde la Ia de Julio ĝis la IOa de Septembro. Ĉi jare ĝi festos sian 20an datrevenon; estas granda evento, kiun vi ne rajtas preteratenti. Klopodu viziti Gresillon almenaŭ kelkaj tagojn, vi certe revenos kontenta. Speciale interesa por la infanoj estas la unua periodo de la Ia ĝis la 23a de Julio. Kiu ŝatus okupiĝi pri grupeto da infanoj? Petu informojn de S-ino Vincent . Les Andelys.

## Ĉu vi estas kandidato?.......

Okaze de la kunveno de U.N.E. en Rouen, oni renovigos la estraron Do, bonvolu sendi vian eventualan kandidatecon al la nuna sekretariino:

Sinjorino Claudine POTTIER
2I Allee des Roitelets. 76 - YVETOT.

KAJ KIU URBO DEZIRAS ORGANIZI,

la kunvenon venontjare? ?

Eble CAEN, LISIEUX, LE HAVRE;;........

Anoncu vin antaŭ la Ian de Majo. DANKON.

---

## Ni funebras.

Jus antaŭ presigo atingis nin la informo pri la morto , 8I jara de Sinjoro LAVALLEE, edzo de nia samideanino, Sinjorino LAVALLEE, el Le Havre, estraranino de la Federacio kaj anino de nia Normanda Unuiĝo, kiu multe laboras por Esperanto.

Al ŝi ni sendas, nome de ambaŭ asocioj, niajn plej sincerajn kondolencojn.

Polycopie par le Centre Culturel d'Esperanto d'Yvetot.

Depot Legal. Ier Trim. 72
La gerante. Mme POTTIER.